3622 North Market
St. Louis 13, Mo.
Usono, 16-XII-1957

"La Praktiko"
Riouwstraat 172
Den Haag, Nederlando

Karaj gesamideanoj:

Ĉi-kune mi sendas eltranĉaĵojn de du artikoloj pri Esperanto, kiuj aperis lastatempe en granda ĉi-urba ĵurnalo. Unu sciigas pri kurso — ties kunvenojn dekdu gelernantoj (plenkreskuloj) fidele vizitadas.

Troviĝos kunsendite ankaŭ kvin-dolara monbileto, kontraŭ kiu bonvolu sendi la jenajn:

Mendo 47.43 st
al UL 24.-
71.43 St

1 jarkolekto de "La Praktiko" - 1957

19 DEC. 1957

1 ekz. "La Vivo de la Plantoj" - Neergaard

Eventuala superresto estu donaco al U.L. Send. 24 br.

La ekzempleroj de "La Praktiko" tre taŭgas por transdono al nov-interesitoj kiel ekzemplo de la Esperanta gazetaro.

Kun elkora simpatio al viaj klopodoj
George Falgier

Hago, 4-II-1958.

Al s-ro George FALGIER,
St.Louis.

Estimata samideano!

Vian leteron de la 16-XII-57 ni bone ricevis kaj ni dankas pro viaj interesaj sciigoj kaj la aldonitaj artikoloj. El ĉi tiuj ni vidas vian fervoran aktivecon. Ni gratulas vin kore pro via sukcesa agado kaj ni esperas, ke vi sukcesos krei en via grava urbo viglan Esperanto-vivon.

Vian mendon ni plenumis kaj ni forsendis al vi en du paketoj per la mara poŝto la Praktiko-jarkolekton 1957 kaj la libron LA VIVO DE LA PLANTOJ.

Post depreno de la prezoj kaj poŝtkostoj, el via sendita pago de 5.-- dolaroj superrestis 24 steloj. Ĉi tiun sumon, konforme al via esprimita deziro, ni enskribis kiel vian donacon de 24 aldonaj brikoj al UL. Ni multe dankas pro via subteno. La glukvitancetojn por via membrokarto ni sendos en unu Praktiko-numero poste, ĉar ni ne rajtas enmeti ilin en ĉi tiun leteron.

Plezurigas nin via konstato, ke la numeroj de La Praktiko taŭgas por la propagando. Redaktante la gazeton ni ĉiam klopodas fari numerojn, kiuj vekas favoran impreson kaj naskas emon lerni la lingvon.

Kun bondeziroj por via agado kaj esperante ricevi de vi bonajn novaĵojn, ni salutas vin

samideane kaj amike,

3622 North Market
St. Louis 13, Mo.
Usono. 24-XI-58

La Praktiko
Riouwstraat 172
Den Haag, Nederlando

Karaj Amikoj:

Verŝajne, la nova gimnazia Esperanto-klubo povas esti tre grava por nia movado en ĉi tiu regiono. Mi jam abonigis ĝin al <u>La Praktiko</u> (1958 kaj 1959) pere de S-ro Parrish, nome de la konsilantino, Sinjorino Marguerite Slack.

Ĉu estas eble aperigi la jenan (aŭ similan) anoncon?

---

Nova gimnazia Esperanto-klubo (35 gejunuloj 14-17-jaraj) bonvenigos kuraĝigajn salutojn el ĉiuj mondpartoj. Ĉiu sendinto <u>ri</u>cevos respondon.

---

ESPERANTO-KLUBO
SENIOR HIGH SCHOOL
JACKSON AND BALSON AVES.
UNIVERSITY CITY 5, MO.
USONO

---

University City estas antaŭurbo de St. Louis. Tie situas la Vaŝingtona Universitato — pro tio la urbnomo. Kore,

George Falgier
AM de UL

3622 North Market
St. Louis 13, Mo.
Usono. 24-XI-58

F-ino V.C. Nixon
Sekr. de ILEI
183 Woodlands Park Road
Birmingham 30, Anglio

Kopio por La Praktiko

Kara F-ino Nixon:

Tre atente mi tralegis la malnovajn kaj kurantajn numerojn de la <u>Instruista Letero</u>, kaj ankau la bultenojn de SBET, kiujn vi tiel afable sendis. Dankon! Mi trovis la informojn tre interesaj, kaj konstatis, ke jam multaj sukcesoj estas atingitaj per multjara, sindona laborado de Esperantistaj instruistoj. Mi esperas, ke venontaj sukcesoj en Usono ne estos inter la malplej gravaj.

En frua oktobro mi estis invitata paroladi pri Esperanto antau la <u>Modern Language Club</u>. Proksimume 40 geinstruistoj ceestis, kaj auskultis tre atente. Poste, mi surprizigis pro la varma simpatio kaj intereso esprimitaj de multaj el la auskultintoj. Nun almenau dek instruistoj ekstudas la lingvon Esperanto, kaj la plejmulto el ili konsistas el prilingvaj instruistoj! Tio kredigas min, ke estos eble trovi subtenon por Esperanto inter la prilingvaj instruistoj ankau aliloke en Usono. Ili konstatos, ke Esperanto instruata kiel baza lingvo en la lasta jaro (la oka) de la elementa lernejo, au en la unua jaro de la duagrada lernejo (gimnazio) povas helpi al pli sukcesa instruado de la fremdaj kaj latina lingvoj, car gi malkasos kaj preparos la pli talentajn studentojn, kaj malkasos ankau la malpli kapablajn, kiuj ne povus sukcesi en la pli rigora studado, sed nur bremsus la progreson de la klasoj pri fremdaj lingvoj. Oni agnoskas ankau, ke Esperanto povas alporti kulturajn kaj praktikajn avantagojn al studentoj, kiuj pro unu au alia kialo neniam studos fremdan lingvon.

Instruisto kaj instruistino de la University City Senior High School, kiuj audis la paroladon, invitis min paroladi antau kunveno de la por ci-okazo kunigitaj lingvo-kluboj de ilia lernejo. Do, malfrue en oktobro, la junaj geanoj de la franca, germana, hispana kaj latina kluboj kunvenis, launombre cirkau 80 homoj. Denove mi surprizigis pro la serioza atentado kaj forta intereso montrataj de la gejunuloj. Post unu horo mi mem devis ekklopodi por fermi la kunvenon, car oni ankorau volis proponi demandojn. Kaj tio okazis post la lerneja horaro---la aliaj studentoj jam hejmeniris!

La intereso dauris tiel forta inter la studentoj, ke unu instruistino, kiu jam antau jaroj interesigis pri Esperanto sed ne trovis oportune ekstudi gin, decidigis kapti la okazon, kaj proponis sin kiel konsilanton por la dezirata Esperanto-klubo. La klubo organizigis kun 35 gemembroj. Kvankam mi dejoras en alia lernejo fore je pluraj mejloj, mi helpas laupove al la klubo, havigante al gi lernolibrojn, ktp. La kurage konsilantino, Sinjorino Marguerite Slack, lernas la lingvon kune kun siaj klubanoj. Estos forta instigo al plua tia disvastigado de Esperanto ci-loke se la klubo ricevos salutojn de gejunuloj kaj grupoj junulaj en ciuj mondpartoj. Mi mem alprenas respondecon, ke ciu sendinto ricevu respondon. La adreso:

Esperanto-Klubo
Senior High School
Jackson and Balson Aves.
University City 5, Mo.
Usono

Mi intencas baldau eldoni cirkuleron cele organizi filion de ILEI en Usono, kun la ci-lokaj instruistoj kiel kerno. Mi gvidas du vesperajn kursojn, marde kaj merkrede.

Kore, George Falgier

## To Beat that 4c Rate

A.H.A. members whose dues for 1958 have not been paid will have received a bill urging them to pay before August first when postal rates go up. Yes, we must save pennies to meet our budget this year, and summer is the time when we most need the continued backing of our members. To vote in the 1959 A.H.A. election next spring your 1958 dues must be paid. Moreover, it is our custom to send the first four issues of "The Humanist," then place the names of unrenewed General Members on the inactive list (The inactive list means those to whom "The Humanist" is not sent) until dues are paid. So to be sure of all six issues of "The Humanist"—even if too late to save that penny, please pay now! Repeated billing and dunning will be costly. The truth of Benjamin Franklin's statement that "He who gives promptly, gives twice as much," becomes more true with every increase of postal rates.

## Estas Bela!

"The North American Esperanto Review" for Majio-Junio, 1958 published a picture of the St. Louis Esperanto Group which we also present here.

Says the Review, "This is part of an Esperanto class which meets every Wednesday night at the Humanist Center in St. Louis. Six others could not be present for the photo. The St. Louis Chapter's interest in Esperanto is the implementation of a resolution adopted by the American Humanist Association two years ago supporting the action of Unesco and calling the attention of its members to the international language problem." Unesco had endorsed the Esperanto movement.

Standing, left to right, are Dr. J. J. Kessler, President of the St. Louis chapter, and George Falgier, Esperanto instructor. Seated, left to right, are Mrs. C. Sinclair, Laura Falgier, Joe Eisele, G. H. Stephens, Salvador Raia, and Alta Pryor.

The class has made a fifteen minute tape which may be obtained from Humanist Tape Library, 615 Davis Street, Evanston, Illinois.


# FREE MIND

*Membership Bulletin of the American Humanist Association*

Published monthly except August and December at Yellow Springs, Ohio, by the American Humanist Association, The Gate House, Springfield Pike, Yellow Springs, Ohio. $1 a year, available to members of the AHA only. Entered as second class matter at the Post Office at Yellow Springs, Ohio, under the act of March 3, 1879.

Volume 6 July-August, 1958 Number 7


# AHA Bylaws Revised June 22, 1958

At a June meeting in Indianapolis of the Board of Directors, final and unanimous action was taken by the Directors present approving, after further changes and careful reading, the revision of the Bylaws presented by attorney Charles B. English, chairman of a special committee assigned to the task by the Board of Directors at its meeting in March, 1958, at Cincinnati. The Bylaws of the Association are a dynamic document with successive changes made to bring them abreast of advancing experience. The new Bylaws integrate previous amendments providing for area Humanist Councils. They also make permanent the Delegates' Assembly first held at the most recent annual meet in Chicago (1958).

A chief concern of the Board at the June 22 meeting when the revision present herewith was adopted was to make it easily possible for groups to nominate candidates (only twenty five members in good standing are necessary for nomination by petition) but to give more time following the announcement of nominations by the Nominating Committee for petitions to be circulated, ballots to be mailed and validated. The revised Bylaws make it specific that proxies—distinct from ballots—are not related to elections but are for use only at business meetings of the Association.

Members are asked to file the enclosed copy of the Bylaws which will be the only copy they receive. Further Amendments will appear in "Free Mind" as passed.



# What Will September Bring?

By JAMES M. HUTCHINSON

Some of President Eisenhower's aides have suggested that the chief executive heaved a great sigh of relief when Federal Judge Harry Lemley decided that Central High School in Little Rock, Arkansas, would not be required to continue with integration until 1961. The judge found things intolerable, and suggests at the conclusion of his opinion that it is in the public interest of both white and Negro students that "we have a peaceful interlude."

It must be admitted that Mr. Eisenhower's difficulties and worries about the desegregation problem are mostly all of his own making. At no time, even when the whole nation cried out for him to say something, has he given any real and forthright indication that he stands behind the Supreme Court and the desegregation rulings of 1954 and 1955. Neither has he insisted that the Department of Justice use the powers which it has to enter civil rights cases or to use its good offices for the solution of problems in the area of desegregation.

A whole high school generation has come and gone since 1954. Some progress has been made although it seems to be little enough: 350,000 Negro children are now in school districts in the south which have begun or completed desegregation; nearly 2,500,000 Negro children still attend segregated schools in seventeen southern states.

The president's great relief may hold out in Little Rock. He may think that by not facing the issue it will be solved. The segregationists are not rejoicing that this is a peaceful interlude. Rather, they are marshalling all of their forces to continue to fight against any type or degree of desegregation. The "massive resistance" of the state legislatures is just that. In the most solidly segregated states dozens of bills have been passed to hamper even "deliberate speed." Where state statutes are in conflict with federal court orders, there most likely will be considerable disruption in September.

In Virginia four communities are under federal court order to permit desegregation in the fall. Yet the new statutes make it possible for the state to withhold state financial aid to any school districts which attempt desegregation. Virginia has a proposal now to give tuition scholarships to children attending nonsectarian private schools.

Southern politicians are urging that all legal and constitutional steps be taken to prevent desegregation. Deliberate delay seems to be the technique, even though the south knows perfectly well that ultimately integrated schools must come.

On June 30, just before the summer recess, the Supreme Court refused to review Judge Lemley's decision, denying the petition for certiorari which had been entered by the N.A.A.C.P. Chief Justice Earl Warren read the order in which the court expressed its firm conviction that the Court of Appeals for the Eighth Circuit in St. Louis would "recognize the vital importance of the time element in this litigation, and that it will act upon the application for a stay of the appeal in ample time to permit arrangements to be made for the next school year."

It would look as if the Supreme Court was making this statement as a sort of mandate to the judges in the Eighth Circuit to act promptly. Arthur Krock, columnist for the New York Times and an expert on constitutional problems, predicted this even before the Washington Court denied the review. He also suggests that if the Court of Appeals rules that the suspension of desegregation shall not stand, then the Little Rock School Board can ask Justice Whittaker who supervises the Eighth Circuit for a stay. The N.A.A.C.P. may have the same choice if the suspension is upheld.

Harry Ashmore of the "Arkansas Gazette," who sometimes seems to waver between practicality and principle, wrote on June 21 about a welcomed "breathing spell" for the Little Rock community. On June 29, he appeared on the Mike Wallace interview and predicted that the suspension of desegregation would be reversed on appeal. It is hoped that his last position will be the one of the court.

In surveying what has happened since 1954, it is difficult to see that much has been done for desegregation. Time and time again the really great minds of the nation have insisted that the federal government should take full responsibility for seeing that the law is upheld. It would look as if the executive is trying to contradict the words of the Chief Justice who said about the desegregation decision, "the vitality of these constitutional principles cannot be allowed to yield simply because of disagreement with them." When the president stalled in September of 1957, he had to use his ultimate weapon: troops. And he may find that he will have to do it again when a new Little Rock arises.

The dilatory procedures of the government and the chief executive encourage no good, and they only tend to strengthen and confirm the growth of Faubuses. September will not be a quiet month. As it looks now there will be no time to sigh with relief no matter what happens in the Little Rock case.

## Humanist Education Press

The latest number (vol. 4, No. 3) of "The Toledo Humanist," official publication of the T. A. D. Committee, was a Commemorative Issue about "Thomas Paine: Apostle of Freedom." The Humanist Education Press is now a legal corporation under the laws of the State of Ohio, and its officers are: Pres., John Wm. Myers; Vice-Pres., Dr. Gardner Williams; Secretary, Paul Johns; and Treasurer, Dolores Hudson.

## Central Illinois

A Humanist Advance Committee for Central Illinois is organizing. Its members will include Mrs. Margaret Patterson, Mrs. Carolyn Kennedy, and Mr. Ken Lake of the Peoria Chapter, Dr. Leo F. Koch and Vashti McCollum of the Humanist Society of Illini at Urbana, Dr. Stanley K. Norton of Bloomington, and from Decatur, Mr. Harry Cole and Mr. Frank Mackay.

Usona Sekcio
U.S. Section
Founded 1959

# Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

International League of Esperantist Instructors
Fondita 1949

*En konsulta rilato kun Unesko* *In consultative relationship with Unesco*

*Internacia Estraro:*
International Officers:
**PREZIDANTO**
F-ino J. Dedieu
70, Ave. V. Segoffin
Toulouse, France
**SEKRETARIO--KASISTO**
F-ino V. C. Nixon
183, Woodlands Park Road
Birmingham 30, England
*Por kompleta listo, vidu la Jarlibron de*
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

**USONA VOLONTULA KOMITATO**
U.S. Volunteer Committee

*Usona Reprezentanto:*
U.S. Representative:
George Falgier
3622 North Market
St. Louis 13, Mo., U.S.A.
Tel.: JE 5-8783

Internacia Esperanto-Instituto
Riouwstraat 172, Den Haag

30-III-59

Karaj Samideanoj:

Tri kluboj nun troviĝas ĉi-loke en duagradaj lernejoj (kun gestudentoj 14-jaraj ĝis 18-jaraj)

(1)
Esperanto-Klubo
U. City High School
7401 Balson Ave.
University City 5, Mo., Usono
(Konsilantino: S-ino MARGUERITE SLACK)

(2)
Esperanto-Klubo
Wellston High School
6301 Wells Ave.
Wellston 14, Mo., Usono
(Konsilanto: S-ro GEORGE HALTERMAN)

(3)
Esperanto-Klubo
Hadley Technical High School
3405 Bell Ave.
St. Louis 6, Mo., Usono
(Konsilanto GEORGE FALGIER)

Duagrada lernejo en Usono kutime inkluzivas la 9-an tra la 12-a lernejjaroj.

(Bv. legi aliflanke)

24.- nt. al UL
47.43.- a ms.
71.43 nt. = 5.- dol.

2. K 47.43 nt.

- 6 JUNI 1959

Ĉi kune mi sendas monbileton kvindolaran, esperante ke ĝi taŭgos por pagi la jenajn:

1) Ab Abono al "La Praktiko" por 1959. Bv. sendi al S-ro George Halterman ĉe la dua adreso (Wollston).

2) Kursa Lernolibro, la parola metodo (Privat)

3) Mary kaj Sulo

4) 100 ekz., poŝtkarto kun la himno

5) 500 ekz., glumarkoj, verda stelo kun "Esperanto"

6) Demandfolioj por komenca kurso, ĉiuj kvar

7) Demandfolioj por daŭriga kurso, ĉiuj tri

8) Ekzercaj taskoj por daŭriga kurso, ĉiuj 18

9) La verda lakto

10) Numeroj de la Esperanta Biblioteko Internacia ĝis elĉerpo de la sendita sumo:

N-roj 2, 5, 6, 9, 12, + 13-18, ~~20~~

- 3 SEP. 1959

Bv. sendi (2) ĝis (10) al mia adreso:

George Falgier
3622 North Market
St. Louis 13, Mo., Usono

Hago, 3-IX-1959.

Al s-ro George J. FALGIER,
St.Louis.

Estimata samideano!

Kun multa intereso ni legis viajn lastatempajn leterojn kaj ni kore gratulas pro via ampleksa kaj bonege farita laborado, kiu alportis rimarkindajn sukcesojn. Aparte ni gratulas pro la sukcesa kongreso de ELNA, kiun vi organizis. La diversajn informojn, kiujn vi sendis, ni publikigos en la proksimaj numeroj de La Praktiko.

En via letero de la 30-III-1959 vi sendis 5 dolarojn kaj faris mendon, sed pro diversaj kaŭzoj ni ne povis sendi la aĵojn. Nun ni sendas al vi ĉion, laŭ la sekvanta fakturo:

| | | |
|---|---|---|
| 1 | KURSA LERNOLIBRO | 4.-- st. |
| 1 | MARY KAJ SULO | -.80 |
| 100 | POSTKARTOJ, himno Esperantista | 16.-- |
| 500 | GLUMARKOJ, stelo kun "Esp." | 8.-- |
| 4 | DEMANDFOLIOJ por kom. kurso, -.16 | -.64 |
| 3 | " " daŭr. " " | -.48 |
| 18 | EKZERCAJ TASKOJ po -.32 | 5.76 |
| 1 | LA VERDA LAKTO | -.60 |
| 15 | n-roj de ESP.BIBL.INT. (2, 5, 6, 9, 12, 13, 14/15, 16, 17, 18, 20, 21, 22, 26) po 1.-- | 15.-- |
| | | 51.28 |
| | Rabato 20 % | 10.26 |
| | | 41.02 |
| | Poŝtkostoj | 6.41 |
| | | 47.43 |
| | Abono La Praktiko 1959 al la Esperanto-Klubo ĉe Wellston High School (s-ro G.Halterman) | 24.-- |
| | | 71.43 st. |

Ĉi tiu sumo estas pagita per la 5 dolaroj, kiujn vi sendis en la letero.

Ni kutimas doni ĉe niaj propraj eldonaĵoj rabaton de 20 % al la Esperanto-instruistoj, do ni notis ankaŭ vin en tiu kategorio. Por ke nia livero estu egalvalora al la sumo, kiun vi sendis, ni aldonis pluajn numerojn de la Esp.Biblioteko internacia. La objektoj iras en tri malgrandaj paketoj per la mara poŝto, sen registrigo.

Ni gardas en via konto ankoraŭ 30 stelojn, kiujn vi sendis al ni antaŭ unu jaro por 2 jarkolektoj binditaj (1957 kaj 1958) de La Praktiko. Sed ni ne havas binditajn kolektojn de tiuj jaroj. Ĉu vi konsentas, ke ni sendu nebinditajn?

El la fotoj, kiujn vi sendis, kelkajn ni jam publikigis, sed ni havas gravan malfacilaĵon pro la kosto de la kliŝoj, ĉar ni ne havas la necesan monon. Sed ni estas pretaj publikigi ĉiujn bildojn, se vi aŭ via Klubo konsentas pagi la koston de la kliŝigo. Tio estas 40 steloj por unu kliŝo. En tiu kazo la kliŝoj apartenos al vi kaj post la publikigo ni sendos ilin al vi. Vi povos poste uzi ilin por presigi poŝtkartojn k.t.p.

Atendante vian respondon ni salutas vin kun koraj bondeziroj, samideane kaj amike,

S-ro Andreo Ĉe
Internacia
Esperanto-Instituto
Riouwstraat 172
Den Haag, Nederlando

3622 North Market
St. Louis 13, Mo., Uson
6-XII-59

Estimata samideano—

Koran dankon pro via afabla letero kaj klarigo pri mia konto. Mi ĝojas, ke via afero denove antaŭen iras.

La pakaĵoj alvenis bonorde, kaj mi estas tre kontenta pri ili. La aranĝo rilate pagon por kliŝoj de aperontaj fotoj estas kontentigā kaj konvena, kaj mi intencas profiti ĝin kiam mi denove havos aperindajn fotojn. Verŝajne, la jam senditaj estas ne plu aktualaj, kvankam mi nun ne povas rememori klare, pri kiuj fotoj temas.

La ne-binditaj jarkolektoj de La Praktiko, 1957 kaj 1958, estas plene kontentigaj. Mi deziras aĉeti ankaŭ du jarkolektojn ne-binditajn de 1959, kaj tiucele kunsendas 3 dolarojn.

10 DEC. 1960

Ont. 30.- St.

Kun plej koraj bondeziroj,

George Falgier

K 42.86 St.

11 APR. 1960

NI PETAS aperigon de jena anonco en Esperantaj gazetoj:

Ĉi-loka Vespera Lernejo por Plenkreskuloj por la unua fojo ofertas Esperanton kiel plenrajtan lernobjekton kun salajrita instruisto. Salutkartoj amase senditaj el ĉiuj mondpartoj multe helpos al nia sukceso. Ĉiu sendinto ricevos bildkartan respondon. Adreso:

Esperanto Class
Adult Evening School
951 North Hanley Road
University City
St. Louis 30, Mo., Usono

---

La supre anoncita okazaĵo prezentas gravan paŝon antaŭen por la ĉi-loka Esperanto-movado. Neniam antaŭe en ĉi tiu regiono Esperanto estis oficiala kurso en la temaro de lernejo. Se la kurso sukcesos ĉe la plenkreskuloj (kiuj ja estas la gepatroj kaj geonkloj!), kaj se ili postulos enkondukon de Esperanto en la lernejoj por infanoj kaj junuloj, ĝuste tio povas okazi en ĉi tiu progresema lernejo-sistemo de University City.

University City (Universitato-Urbo, tiel nomita ĉar Vaŝingtona Universitato situas ĉi tie), kun 40,000 enloĝantoj, estas la plej granda antaŭurbo de la urbego St. Louis.

Jam alia sukceseto estis instigita per la supra: alt-nivela libro-vendejo, ofte vizitata de universitatanoj kaj aliaj intelektuloj, konsentis doni spacon sur breto al Esperantaj libroj. Ĝi estas la THREE ARTS SHOP, 6501 Delmar, St. Louis 30, Mo. (Telefono: PArkview 5-4040.) La subteno kaj intereso de la ĉi-lokaj Esperantistoj decidos la gradon de la sukceso ĉe tiu entrepreno.

George Falgier

Instruisto; Usona Reprezentanto de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
3622 North Market
St. Louis 13, Mo., Usono

Salutojn!
G. F.

Internacia
Esperanto-Instituto
Riouwstraat 172
Den Haag

3622 North Market
St. Louis 13, Mo.
Usono. 10-XII-~~60~~ 59

Karaj Samideanoj—

Kun kontento mi rimarkis en lasta *Praktiko* aperon de unu foto de mi proponitan. Por helpi pri via elspezo, mi ĉi-kune sendas 40 steloj̃n. Tamen, mi ne deziras ricevi ĉi tiun kliŝon, ĉar ĉe mi la foto estas jam ne-aktuala.

KK - 2 FEB. 1960

Mi sendas ankaŭ 48 stelojn por dujara abono de *La Praktiko* al jena adreso: Al UC 48.- Stl. - 2 FEB. 1960

Ab PIUS XII MEMORIAL LIBRARY
~~ST. LOUIS UNIVERSITY~~
~~3655 WEST PINE~~
~~ST. LOUIS 8, MO.,~~ USA

korekto adresita

pagis 24 stelojn ~~1960~~ -1960 1961

Estas granda domaĝo, ke ne ekzistas belaspekta gazeto por infanoj. Ĉu vi iam konsideris aperigi por infanan rubrikon en *La Praktiko*?

Kore,

George Falgier

+ 40 steloj por kliŝo